



Babilanto

INFORMILO DE AGADO POR LA PROGRESIGO DE ESPERANTO EN TOGOLANDO
n-ro 15 aprilo – junio 2016

Karaj legantoj,

Jam de kelka tempo vi ricevas la revuon en kvar paĝoj, kaj tio vin maltrankviligas?

Estu certaj: ĉio bone iras ĉe ni kaj la aktivaĵoj daŭre okazas ĉiun trimestron. Nur, ni ekpermesis al ni eldoni la revuon en la papera formo, kaj kvarpaĝa elpresaĵo ŝajnas simpla kaj praktika por atingi grandan nombron da samlandanoj...

Jen ni profitas la okazon por vin inviti helpi kaj aliĝi amase al la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto, por ke ĉi tiu historia kaj kontinenta evento superu ĉiujn prognozojn.

En tiu ĉi numero vi legos ankaŭ kelkajn novaĵojn pri agadoj ĉi-tieaj kaj alilokaj...

Bonan legadon!

Nubuke

Chers lecteurs,

Cela fait quelques moments que vous recevez la revue en 4 pages, et cela commence à vous inquiéter?

Rassurez-vous: tout va très bien chez nous et les activités continuent chaque trimestre. Seulement, nous nous sommes permis d'éditer la revue en support papier, et quatre pages nous paraissent simples et pratiques pour atteindre un grand nombre de nos concitoyens...

Nous en profitons pour vous inviter à contribuer et adhérer massivement au 6^e congrès panafricain d'Espéranto, pour que cet événement historique et continental dépasse toutes espérances.

Dans ce numéro vous lirez aussi quelques nouvelles d'ici et d'ailleurs...

Bonne lecture !

Nubuke



ESPERANTO

ESPERANTO-TAGO

26.07.2016



Justa komunikado

Elternu Esperanton:
www.jernu.net



Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interneta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

LA LINGVO INTERNACIA

Afrika Kongreso de Esperanto jam la sesan fojon ĉi-jarine!

La sesan fojon afrikanoj sin preparas por celebri la plej gravan eron de sia agado, nome la Afrikan Kongreson. Tiu tutkontinenta renkontiĝo gastos en la norda tanzania urbo Bunda, de la 24-a ĝis la 31-a de decembro 2016.

La kongresaj organizaj laboroj okazas kunlabore inter la Afrika Komisiono de UEA kaj la Tanzaniaj aktivuloj, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio.

Tiu jara kongreso ne organiziĝas kiel renkontiĝo nur por afrikanoj, sed kiel evento por parolantoj de Esperanto kaj geamikoj de Afriko. Ankaŭ pro tio ĉiam bonvenas diversaj kontinentanoj por kiuj ĝuste estos abundaj aktivaĵoj por malkovrigi al ili la multflankajn aspektojn de la kongresa lando kaj la situacion en unuopaj afrikaj landoj.

Ekde la jaro 1990 Afrika Kongreso estas la plej grava ero de la Afrika Agado kun ampleksa programo por



Kongresa konstruaĵo

kuraĝigi kaj kunigi esperantistojn ĉirkaŭ bela sonĝo: kunlaboro interafrika por pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi Esperanton, cele al la komuna progreso de Afriko.

Tiu tradicio do estas jam 26-jara ĉi-jare, sed la kongreso en Bunda portas la numeron 6, ĉar okazis 17-jara paŭzo inter la 4-a kaj la 5-a, el kiu estis komuna decido okazigi ĝin pli regule en trijara ritmo.

Mi finlernis Esperanton en 2009 kaj nun verve zorgas ĝian diskonigon

en Rutshuru. Mi instruas ĝin ĉe la radio kaj en orfa bazlernejo. Mi neniam E-renkontiĝon partoprenis ekster mia hejmurbo. Mi deziras ĉeesti en la 6-a AKE por paroluzi mian E-on kun novaj geamikoj kaj sperti pri kongresa atmosfero, sed pro limigita eblo mi ne povos pagi mian vojaĝon kaj restadon en la kongreso. Mi petas vin bv helpi min efektiviĝi revon mian, skribas en letero aktivema junulo el DR Kongolando.

Kvindek tiaj petoj estis ricevitaj el la kontinento. Do, se vi decidus subteni la kongresan kason tio eblas laŭ la konto "Afriko" ĉe UEA kun indiko "AKE-2016" por ebligi realigon de vera tutkontinenta kongreso almenaŭ subsahara.

Eblas multon ekscii pri AKE per la retejo: www.esperanto-afriko.org kaj ricevi utilajn informojn ĉe la organiza komitato, skribante al ake-2016@yahoogroupes.fr.

Francino Annie Grente en Tanzanio

Francino Annie Grente vojaĝis kaj restadis en Tanzanio, orienta Afriko, fine de februaro 2016. Surloke, ŝi partoprenis nombrajn aktivaĵojn de lokaj esperantistoj kaj precipe de la asocio *Mazingira*, kiu klopodas por helpi la lokajn loĝantojn.

Laŭ Mramba Simba, la prezidanto de *Mazingira* kaj de la Tanzania Esperanto-Asocio, li iris renkonte al Annie en la urbo Dareslamu por bonvenigi kaj gvidi ŝin tra la malnova urbo Bagamoyo. Gvide de s-ro Davido Mapengo la gastino ankaŭ konatiĝis kun la urbo Mwanza, Bunda kaj la gastejo de la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto.

Post iom da turismumado kaj vizito al lokaj aŭtoritatuloj kaj grupo helpe de la lokaj fortoj, Annie komencis sian instruon agadon: *Mi instruis mian unuan Esperanto-kurson en la "Esperanto" lernejo de Merembeka. Estis du grupoj kaj en ĉiu grupo proksimume 100 studentoj, iomete pli ol en Francio. Per Bek kurso, kiun mi uzis kaj uzos, bonŝance oni povas instrui al granda grupo. Mi ankaŭ komencis instrui en la familio de sinjoro Mramba, ŝi klarigas.*

Necesas mencii, ke Annie Grente finstudis en la instruista trejnado



en Poznan Pollando. Ŝi antaŭe venis en Afrikon precize en Tunizion, kie ŝi gvidis kvintagan lingvan kurson al grupo de deko da tunizianoj kun kiuj ŝi poste prezentis surloke Esperanton dum la Monda Socia Forumo, marte 2015.

Post kelkaj monatoj okazos la 6-a AKE en Bunda kaj eble vi deziros kuraĝigi iun aŭ plurajn lernanto(j)n de Merembeka plu lerni la lingvon – estos malavare viaflanke. Sed vi povos ankaŭ ebligi al tiuj junaj genovuloj partopreni unufoje en sia vivo internacian E-renkontiĝon en sia hejmkontinento, pagante por ili aliĝon kaj restadon dum la kongresa periodo.

Oni povas ricevi pliajn informojn pri la Afrika Kongreso de Esperanto per: ake-2016@yahoogroupes.fr

Nubuke

La lernejo «La Voilà»

Ni renkontis samideanon en Tamatave, Madagaskaro, kiu nomiĝas Cleophane. Li aĝas 28 jarojn. Post longaj studoj en la seminariejo, li intencis fariĝi pastro.

Sed, ĉar li malbone rilatis kun sia estro, li rezignis. Li decidis krei novan lernejon kaj aĉetis ion antaŭ du jaroj. Hodiaŭ la lernejo entenas 17 geinstruistojn, kiuj zorgas pri 412 gelernantoj.

La naŭ klasĉambroj akceptas la infanojn en la aĝo inter 5 kaj 15 jaroj. La lernejo staras en malriĉa kvartalo kaj la lernokosto atingas 12000 ariarojn monate kaj la aliĝkosto 50000 ariarojn jare.

Por grandaj familioj, ekde la tria infano, la lernokosto malaltiĝas ĝis 10000 ariaroj kaj aliĝkosto malaperas. Kelkaj pagas nenion.

La rezultoj en tiu ĉi lernejo estas mirindaj kaj atingas 100 procentojn da sukceso danke al la vigla etoso kaj la sindonemo de la teamo.

Ĉiuj gelernantoj devas aĉeti violkoloran uniformon, kaj tiuj, kiuj loĝas malproksime povas aĉeti manĝon surloke kontraŭ 1000 ariaroj.

Beatrice la boonklino de Cleophane zorgas pri la provizo de la lernejo.

Cleophane ja intencas Esperantigi la lernejon kaj jam la geknaboj de la unua kaj dua klaso de la mezlernejo ricevas Esperantajn kursojn. Same instruistoj lernas Esperanton ĉiujn merkredojn posttagmeze. *Devige!* diras Cleophane ekridante. Li intencas ankaŭ ŝanĝi la nomon de la lernejo kaj farbi ĝin verd-kolora!

Verkis Evélyne



Inspira aktivaĵo dum Babilmanĝa Renkontiĝo

Ni babilmanĝis en teretaĝa salono de la universitata centro *ST Jean* en Lomeo, la 5-an de marto 2016. Ĉiuj 9 partoprenantoj unue omaĝis al s-ro Kede Gadji k. Hézekiel, kiu tiam festis sian naskiĝtagon. Ni ĉiuj gaje kaj ĥore kantis “feliĉan datrevenon, feliĉan datrevenon...” por li kaj kune festis lian 23-an jariĝon.

Ĉar promeso estas ŝuldo, s-ro Atchou-Dette Koami lerte instruis la babilmanĝantojn pri raspita kokosaĵo el karamelo, dum Adjévi Adjé prezentis al ili kukbakadon. Ambaŭ personoj antaŭe mem kuiris hejme kaj portis al la kunveno la frandaĵojn pri kiuj ili lernigis teorie la grupon. Estis interese kaj la etoso agrablis ĉe tabloj iom pli poste.

Okazis dummanĝe ankaŭ lingva ludo dum kiu ĉiu ekzerce provis diri

Esperantlingve nomon de du aŭ tri objektoj aŭ aĵoj troviĝantaj en la manĝosalono. La kulmina punkto de tiu ludo estis kiam Ekzekiel facilanime citis ĉiujn partojn de la homa korpo parkere. Laŭ niaj ebloj ni ankaŭ unufoje elprenis la revuon *Babilanto* kaj ĉiuj ricevis provan ekzempleron de ĝi paperforme.

En APETO oni forte kredas kaj esperas, ke tiu revo – aĉeti bakujon en kio estos kuirataj la proponataj receptoj – realiĝos. Tiuj etaj kaj simplaj bongustaĵoj povos esti manĝataj dumkunvene kaj vendita al membroj kiuj deziros, tiel ke oni havos eblojn enspezigi iom da mono por regule funkciigi serene la babilmanĝan tradicion en nia urba Esperantujo.

Babilanto : n° 15 aprilo – junio 2016

Fidilalao Henriel: retradio ĉiam utilas por Afriko

Vi estas konata kiel profesia instruisto, unu el la veteranaj esperantistoj en Madakasgaro, redaktisto de gazeto, verkisto kaj profesia e-isto kadre de la projekto Esperanto Plus, kaj antaŭ ne longe vi fondis la retradion Aminda. Ĉu vi povas mallonge prezenti tiun novan iniciaton al ni ?

Ĉio fontis el mia deziro montri al nia samideanaro, ke Esperanto estas ne nur hobbio, ke ĝi povas esti io serioza. Plie, mi pensis ke se mi starigos retradion, ĝi helpas min diskonigi kaj reklami pri miaj aktivaĵoj, i.a. EP, Les Amis de Wangari Maathai, Nomad'Kurso..., al tiom da gesamideanoj tra la tuta mondo. Mia eta scio pri komputila umado helpis min aranĝi la teknikajn flankojn de la radio, kaj kun helpo de E-amiko el Belgio mi povis aĉeti mikrofonon kaj kaskon. Samklubanoj kvankam ankoraŭ hezitemaj... partoprenas en la radio. Certe mi farus multon per vera radio, sed tio ja havas multajn postulojn kaj mi iel devis rezigni. Aminda Radio Esperanto (ARE) celas la tutmondan esperantistaron por informi ĝin pri Madagaskaro kaj pri Esperanto en tiu lando, pri diversaj projektoj rilate Esperanton. Sed ĝi celas ankaŭ kunlabori kun aliaj e-istoj precipe en Afriko por diskonigi la afrikan movadon.

Kun la naskiĝo de ARE vi sendube travivas novan sperton, ĉu vi povas diri kiel organiziĝas la elsenda laboro. Kio estas la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj ligitaj al retradio?

Jes, temas pri nova sperto por mi ne nur el la kampo de komunikado sed ankaŭ el tiu de edukado. ARE estas teama laboro en kiu mi trejnas la gejunulojn pri la arto paroli en mikrofono por esti aŭdataj... tra la vasta mondo! Mi mem devas zorgi pri la kolektado de la tekstenhavo, tajpi kaj ilin printi. Poste, ĉiu devas legi kaj relegi plurfoje sian tekston antaŭ ol venos la provregistrado. La studio estas en mia ĉambro, kie kutime okazas niaj lingvokursoj. Ni



F. Henriel

faras provan sonregistradon kaj laŭ tio mi alĝustigas la nivelon de la mikrofono. Ekz., por registri unu-horan podkastaĵon necesas preskaŭ deko da horoj kaj ankaŭ oni devas okupiĝi pri la flego kaj plibonigo de la registritaj sonoj antaŭ ol alŝuti ilin. Nun mi scias nur pri la podkasta radio. Oni povas diri ke pli simplas elsendi per tiu kanalo ĉar la ĉefa teknika laboro konsistas nur el la sonregistrado. Por la aŭskultantaro, la retradio donas liberan eblon, kaj granda avantaĝo estas la ebleco reaŭskulti podkastaĵojn iam ajn kaj kie ajn.

Ĉu vi havis la eblon aŭskulti aliajn podkastajn programojn aŭ similajn projektojn, kiuj ankaŭ elsendas rete? Se jes, kiel vi aprezas tiun ĉi retradian projekton?

Mi jam provis aŭskulti Esperante la radion *Vatikano* kaj tre ŝatas la prononcmanneron de la tieaj deĵorantoj. Mi iom ankaŭ aŭskultis *Muzaiko*, sed la ĉefa problemo en Madagaskaro estas la retkonekta kosto. Kiam oni ekzemple vizitas publikan retkafejon, pli urĝas okupiĝi pri retmesaĝoj, elŝutado de bezonataj dokumentoj, alŝuto de podkastaĵoj ktp. Tial ne plu eblas starigi ekzemple blogilon por akompani ARE. Ĉiuokaze, al mi ŝajnas, ke retradio ĉiam utilas por nia komunumo ĉar ĝi respondas al la deziro de la nuntempa junularo en tio, ke estas pli facile kaj simple alirebla por ili.

Vi estas granda Esperanto-aganto en Afriko, kiu estas via diagnozo pri la nuntempa stato

de la kontinenta movado laŭ vi, kaj kiujn sugestojn vi tamen proponas por antaŭenigi la movadon en Afriko ?

Mi mem ne taksas min granda Esperanto-aganto. Afriko estas viktimo de sia propra grandeco. Estante insulano, mi scias preskaŭ nenion pri la situacio en la kontinenta Afriko. En 1996, en Prago, Tabor kaj Berlino, mi renkontis kelkajn afrikanojn kaj interŝanĝis ideojn kun ili do mia kono pri miaj afrikaj gesamideanoj limiĝis al tio. Certe la lingvo progresas en kelkaj landoj kiel Togolando, sed daŭre malmultas la Esperanto-parolantoj en Afriko. Laŭ mia opinio, ideo pri ununura Centra Officejo por la tuta Afriko ne vere taŭgas pro la vasteco de nia kontinento. Kaj la Esperanto-komunumo, krom la instruado de la lingvo al afrikanoj, devas ankaŭ helpi ilin akiri per la lingvo scion teknikan kaj teknologian por disvolviĝo de la kontinento. La plena uzado de Esperanto en nia ĉiutaga vivo estas la sola kondiĉo por la movadon antaŭenigi en nia kontinento.

ARE estas salutinda kaj kuraĝiginda iniciato. Ankoraŭfoje, dankon pro viaj respondoj kaj bonan sukceson al vi kaj al Esperanto en Madagaskaro.

Mi esperas, ke ARE inspiros aliajn samkontinentanojn starigi similajn aŭ eĉ krei pli interesajn projektojn por prefere progresigi Esperanton en nia kontinento ol daŭre fermiĝi en senfinaj kvereloj pri estraraneco kaj k.s. Mi deziras sukceson ankaŭ al via redaktoreca laboro.

intervjuis Adjévi Adjé

La trimonatan revuon

Babilanto

Eldonas: APETO

Redaktas: p/a Nubuke

Tel.:+ 228 90 25 75 49

adjevia@gmail.com

Konto ĉe UEA:

apto_c

La Vojo

Omaĝe al naskiĝtago de Esperanto (26.7.) ni publikigas por vi la konatan poemon *La Vojo de L. L. Zamenhof*.

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.

Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek moko de l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboros la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
«Ho, ĉesu!» mokante la homoj admonas, —
«Ne ĉesu, ne ĉesu!» en kor' al ni sonas:
«Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
»Se vi paciencie eltenos».

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigataj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Kultura semajno en Instituto Zamenhof

La 18-an de marto 2016 finiĝis la dua trimestro en ĉiuj lernejoj togolandaj. Tiu lasta semajno de la trimestro estis okazo por la lernejoj organizi kulturen semajnon. Tial ankaŭ IZO ion faris. Sekvaj linioj priskribas kio okazis.

La 16-an de marto 2016 estis la finalo de la pokalo de la lernejo. Kelkajn semajnojn antaŭe okazis matĉoj inter la klasoj de la lernejo. La lasta matĉo okazis inter la klasoj tria kaj dua kaj tiu ĉi sukcesis venkante per unu golo kontraŭ nul.

La 17-an de marto 2016 estis iom enspezige por la gelernantoj. Okazis kvazaŭ foiro de manĝaĵoj. Gelernantoj pretigis manĝaĵojn, kiujn ili ekspoziciis kaj vendadis al la aliaj. Tiam la kutimaj vendistinoj de la lernejo devis aĉeti manĝaĵojn de la gelernantoj, ĉar ili ne pretigis mem. Okazis ankaŭ diversaj ludoj, kio daŭris de la oka horo ĝis la 14-a, post kiam la tuta lernejo sekvis diskutorondon gvidatan de Gbeglo Koffi.

Mawu (Dio) ne estas maljusta, diras Gbeglo Koffi. Per tio li klarigas, ke nenio estas malebla al la homo. La temo de la diskutorondo: "*De zéro à héros*" (De nulo al heroo) komprenigis al la gelernantoj, ke kiuj malsukcesas en ekzamenoj, tiuj kulpas mem.

Je la tria horo Gbglo Koffi komencis

sian prezenton. Li donis ekzemplojn de homoj, kiuj havis neniom da vivrimedoj sed kiuj finfine fariĝis riĉegaj. La pedagogia direktoro de la duagrada nivelo de IZO rakontis pri sia vivo. Oni komprenis, kiel li suferis sensubtena sed finfine hodiaŭ gvidas grandan lernejon. La gelernantoj miris pri la rakontoj kaj demandis ĉu ankaŭ ili iam estos herooj. La respondo de Koffi estis simpla: *Ĉiuj rajtas fariĝi herooj. Se iuj ne sukcesas, tiuj estas mal-laboremaj kaj tial devas revizii sian konduton. Mawu donis ĉion al ĉiu homo kaj nun estas tasko al ĉiu homo uzi ĉion.* La diskutorondo finiĝis per promeso de la gelernantoj sukcese ĉiuj en la jarfinaj ekzamenoj.

Jes, okazis ekzamenoj ankaŭ je la fino de la trimestro kaj la geinstruistoj devis analizi tion. Tuj sekvis kunveno de la geinstruistoj. Je la duono post la 16-a horo komenciĝis la kunveno de la geinstruistoj. La rezultoj de la ekzamenoj estis prezentitaj. Tiu kunveno fermis la tagon jaŭdan kaj la vendreda rapide alvenis.

Jam frumatene estis matĉo futbala inter gelernantoj kaj instruistoj. Kiam bolanta estis la stadiono de IZO, tiam krakegis la korto de IZO, ĉar muzikoj diversaj dancigis ĉiujn eĉ surdulojn. Kaj la matĉo devis finiĝi kun la venko de la gelernantoj, kiuj enpafis unu golon kontraŭ nul. Tuj aperis pikiniko.

El retletero de **Gbeglo Koffi**

Esperanto Plus Esperanto

De du jaroj mi agadas kadre de la internacia projekto *Esperanto Plus*. Temas pri oficiala asocio sub la franca leĝo laŭ la iniciato de s-ro Marcq Jean-Pierre, la nuna prezidanto.

La ideo estas solidare perlaborigi lertan e-iston en Afriko por ke tiu ĉi povu havi ioman vivdignecon. Tiu ĉi plenumas diversajn E-agadojn i.a. instruadon, informadon, transliman kunlaboron k.s., pri kiuj li aŭ ŝi regule raportas.

Konkrete la asocio starigas grupon da 15 subtenantoj por helpi unuopan esperantiston. Ĉiu grupano donas kotizon de 10€ monate por ke la subtenato ricevu 150€ kiel veran salajron. *Esperanto Plus* jam funkcias en

Togolando, Madagaskaro kaj en aliaj afrikaj landoj.

Tamen aperas problemo. La nombro de la subtenantoj en mia grupo (kiel en aliaj grupoj) malpliĝis, ekzemple, pro forpaso de Hans Bakker, divorco de geedzoj kaj grava malsaniĝo de iuj. La situacio estas nun alarma: necesas trovi novajn subtenantojn por kompletigi la nombron de mia grupo. Tial mi petas vian afablan kontribuon por ke *Esperanto Plus* pluvivu mialande kaj eĉ etendiĝu al aliaj regionoj. Mi anticipe dankesprimas pro via decido helpi nin.

Kiu deziras pli scii la evoluon de tiu asocio, tiu bv viziti la fejsbukan paĝon "Esperanto Plus Esperanto" aŭ la konstruitan retejon: www.esperantoplus.jimdo.com Komprenoble, oni povas ankaŭ rekte kontakti kun s-ro Jean-Pierre <kajtielplu2014@gmail.com>.

Fidilalao Henriel <henrieldrtv@gmail.com>